# KIEL DIRI TRIMANIERE

(11-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:

Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**



Saluton! Kiu estas via nomo?

Saluton! Mia nomo estas Maria, kaj la via?

La mia estas Paŭlo.

Mi salutas vin! Kiu estas vi?

Saluton! Mi estas Maria, kaj vi?

Mi estas Paŭlo.

Mi vin salutas! Kiel vi nomiĝas?

Saluton! Mi nomiĝas Maria, kaj vi?

Mi nomiĝas Paŭlo.



Mi estas Karlo, aŭ mia nomo estas Karlo, aŭ mi nomiĝas Karlo.



Kiu estas vi, aŭ kiu estas via nomo, aŭ kiel vi nomiĝas?

1. **Kiun nomon havas via patro?**
2. **Kiel via patrino estas nomata?**
3. **Kiuj estis la gepatroj de Jesuo Kristo?**
4. **Kiel nomiĝis la iniciatinto de Esperanto?**
5. **Kiu estas la nomo de la strato, kie vi loĝas?**
6. **Kiel estis nomataj la gepatroj de Zamenhof?**
7. **Kiel nomiĝas la vere Internacia Lingvo?**







Kiomjara vi estas?

Mi estas 4-jara.

Kiom da jaroj vi aĝas?

Mi aĝas ses jarojn.

Kiom da jaroj vi havas?

Mi havas kvin jarojn.

1. **Kiom vi aĝas?**
2. **Kiomjara vi estas, aŭ kiomjara vi aĝas, aŭ kian aĝon vi havas, aŭ kia estas via aĝo?**
3. **Kiom da jaroj havis via patrino, en la tago kiam vi estis naskita?**
4. **Kiam vi datrevenas?**
5. **Kiom da jaroj havas Esperanto?**
6. **Ĉu vi estas infano, adoleskanto, adolto, mezaĝulo, maljunulo, grandaĝulo? En kiu fazo de la vivo vi estas?**
7. **Ĉu vi aĝas pli aŭ malpli ol 30 jarojn?**
8. **Kiom aĝas la piramidoj de Egiptujo?**



- ***Mi havas 34 jarojn;***
- ***Mi aĝas 34 jarojn;***
- ***Mi estas 34-jara;***
- ***Mi estas en mia 34-a jaro;***
- ***Mi havas la aĝon de 34 jaroj.***

Kiomalta estas tiu knabo?

Li estas 130 centrimetrojn alta.




Kiom da metroj ŝi havas?

Ŝi havas 1,10m.

Je kiom da metroj li estas alta?

Li estas alta je 1,30m.

1. **Kiomalta vi estas?**
2. **Kiom da milimetroj havas unu metro?**
3. **Je kiom da kilometroj estas la distanco inter via domo kaj via lernejo aŭ laborejo?**
4. **Kiomfoje pli aŭ malpli vi vizitas bibliotekon dum la jaro?**







Je kioma horo vi leviĝas en la mateno?

Mi kutimas leviĝi antaŭ la 5-a kaj duono, helpe de la kokokrio.

En kiu horo vi stariĝas de la lito matene?

Mi stariĝas en la 6-a horo akurate, helpe de mia vekhorloĝo.

Kiam vi ellitiĝas ĉiumatene?

Mi ellitiĝas tuj frue en la mateno, ĉirkaŭ je la 5-a horo.



**Kioma horo estas nun?**

**Nun estas la 10-a kaj 1 kvarono.**



**Kioma horo jam estas?**

**Jam estas unu kvarono post la deka.**



**Kioma horo ankoraŭ estas?**

**Ankoraŭ estas la deka kaj dek kvin minutoj.**


1. **Ĉu vi memoras, kion vi faris hodiaŭ 20 minutojn antaŭ la 7-a matene?**
2. **Kioma horo estas nun, laŭ Grenviĉo?**
3. **Se laŭ via horloĝo estas 20 minutoj antaŭ la tagmezo, kioma horo estas laŭ Grenviĉo?**
4. **Je kioma horo vi ofte tagmanĝas?**
5. **Je kioma horo vi elhejmiĝos morgaŭ?**
6. **Kion eble vi faros morgaŭ 10 minutojn antaŭ la 5-a vespere? Ĉu vi jam povas fari prognozon?**

# Diru kvarmaniere, kioma horo estas en ĉiu el tiuj strangaj horloĝoj.







Vi estas tre ĝentila.

Dankon!

Ne dankinde! Mi parolas vere.



Vi estas tre komplezema.

Mi dankas!

Ne danku min! Estas ja vere.

Vi estas tre helpema!

Mi dankas vin!

Ne estas dankinde! Mi diris nenion, krom la vero.

1. **Kiel oni povas reage respondi al ĝentila laŭdo?**
2. **Se mi diras, ke vi estas tre afabla, kion vi diros responde?**
3. **Ĉu vi estas dankema al tiuj, kiuj helpadas vin?**
4. **Ĉu vi estas poreterne danka al iu, kiu faris grandan komplezon al vi en la pasinteco? Se jes, al kiu vi estas por ĉiam danka?**
5. **Mi kore dankas al vi ĉion, kion vi respondis!**
6. **Mi kore antaŭdankas vin por la prunto de la mono, kiun mi bezonas, por aĉeti grandan ŝipon!**

Kio vi estas?

Mi estas kantistino.



Kiu estas via profesio?

Mia profesio estas kuracisto.



Kiun profesion vi havas?

Mi havas la profesion de masonisto.



1. **Se vi laboras, por kio vi laboras?**
2. **Se vi studas, por kio vi studas?**
3. **Kiu estas via plej ŝatata okupo, krom via profesio aŭ studado?**
4. **Kiun profesion vi havis komence de via labora kariero?**
5. **Kion vi plej preferas fari: ĉu labori, studi aŭ fari nenion?**
6. **Ĉu vi utiligas vian esperantan agadon kiel vian oficon?**
7. **Kiam vi laboras ĉiutage, ĉu matene, vespere, nokte? En kiu tagoparto?**
8. **En kiu organizo vi laboras, laboris aŭ intencas labori estonte?**



**Kiam vi naskiĝis?**

**Mi naskiĝis en la 18-a de junio 1992.**



**En kiu dato vi estis naskita?**

**Mi estis naskita**

**la 18-an de junio 1992.**




**Kiu estas via dato de naskiĝo?**

**Mia naskiĝo okazis en la dato 18-a de junio 1992.**

1. **Kiu estis la tago de la semajno en la dato, kiam vi naskiĝis?**
2. **Kiu estis via naskiĝodato aŭ dato de naskiĝo?**
3. **En kiu tago de la semajno okazos via venonta datreveno?**
4. **En kiu dato naskiĝis via patra avo?**
5. **En kiu dato oni omaĝas al la nasko de la Kristo?**

Kion vi plej ŝatas studi en la lernejo?



Mi plej ŝatas lerni Goegrafion.

Mi adoras ĝin.

Kiu lernobjekto plej plaĉas al vi en via edukejo?




La lernobjekto, kiu plej agrablas al mi, estas Aritmetiko.

Kiu disciplino estas via plej preferata tie, kie vi lernas?



Mia plej preferata disciplino estas Biologio.

1. **Kiu lernobjekto plej agrablas al vi?**
2. **En via opinio, kiu disciplino mankas en la lernejoj de la tuta mondo, kaj kiu devus esti instruata?**
3. **Kiun lernobjekton vi forigus de la lernejoj, se vi havus povon?**
4. **Inter la tradiciaj sciencoj, kiu estas urĝe reformebla kaj adaptebla al la novaj eltrovoj en la homa naturo?**
5. **Kion vi opinias pri la inkluzivo de Esperanto kiel regulan lernobjekton en ĉiujn lernejojn kaj fakultatojn de la mondo?**




Kie situas via lernejo?

Ĝi situas en la kvartalo Liberdado.

En kiu urboparto estas via edukejo?


Ĝi estas en Liberdado.

Kie en la urbo vi studas?

Mi studas en Liberdado.

1. **Kie situas via lernejo aŭ oficejo?**
2. **Kiel vi iradas al via lernejo aŭ oficejo?**
3. **Ĉu via lernejo aŭ oficejo estas en la urbocentro, en la antaŭurbo aŭ en la kamparo?**
4. **Kiom da lernejoj kaj industriejoj estas en via urbo?**
5. **Kiom longe vi studas aŭ laboras dum la tago?**





**Ĉu vi kredas al Dio?**

**Mi kredas Dion blinde.**


**Ĉu vi kredas je Dio?**

**Mi ne kredas je Li, ĉar mi tute ne konas Lin.**

**Ĉu vi kredas pri Dio?**

**Mi kredas pri Dio, ĉar Li estas kredinda, kvankam ne materie kredebla.**

1. Pri kio vi plej forte kredas en la vivo?
2. Ĉu vi kredas je Dio?
3. Kiu, aŭ pli bone, kio estas Dio, por vi?
4. Kial vi kredas, aŭ ne kredas, je Dio?
5. Ĉu vi kredas la Kriston (tio estas, ĉion, kion li instruis)?








Kiel vi iradas al via lernejo?

Mi iradas bicikle.

Per kio vi veturas al via edukejo?

Mi veturas al ĝi per biciklo.

Kiamaniere vi iras al via lernejo?

Mi iras ĝin biciklante.

1. **Se vi scipovas bicikli, kiam vi lernis bicikli?**
2. **Kiam vi biciklis lastfoje?**
3. **Kiu estas la veturilo plej taŭga por konduki vin al la centro de via urbo aŭ vilaĝo?**
4. **Kiel vi plej preferas veturi al aliaj urboj de via provinco aŭ ŝtato?**
5. **Kiun veturilon vi ankoraŭ ne utiligis?**

En la fino de la semajno, kiel vi distriĝas?




Mi ofte naĝas ĉe la strando.

Semajnfine, kiel vi amuziĝas?



Mi kutime ludas kaj ankaŭ spektas futbalon.

En la semajnfino, kion vi faras por distriĝi?



Mi ĉiam dancas en knaboklubo.

1. **Kies klubojn vi jam vizitis por distriĝi semajnfine?**
2. **Ĉu vi ofte distriĝas per bilardo? Kial?**
3. **Kion vi plej kutimas spekti en la televidilo?**
4. **Kion vi plej ŝatas, ĉu kinon aŭ teatron? Kial?**
5. **Kie lastfoje vi baniĝis: ĉu ĉe plaĝo, ĉe kluba naĝejo aŭ ĉe rivero?**



Mi plej preferas fari fotojn en la ferioj.

Bonege!

Mia hobio estas fotografi dum la ferioj.

Tre bone!

Ferie mia ŝatokupo estas foti.

Ha, kiel bone!

1. **Kiun fotokameraon vi ofte uzas, por fari fotojn: Ĉu fotoaparaton, aŭ la kameraon de via kompufono?**
2. **Kion vi plej preferas fotografi?**
3. **Se vi havus holoprojekciilon (projekciilon de hologramoj), kiajn lumbildojn 3D vi ŝatus projekcii?**
4. **Kiu estis la unua fotilo, kiun vi havis? Ĉu vi ankoraŭ memoras la markon? Aŭ ĉu vi neniam havis fotilon?**
5. **Se vi povus elekti, kian fotografilon vi aĉetus: ĉu tiun kun zom-rimedo, aŭ tiun kun rimedo de veturfoto?**



Kiam vi alvenas en la hejmon, kion vi unue kutimas fari?

Alvenante en la domon, plej ofte mi tuj kuras por ĉirkaŭpreni mian hundon.

Alvenante al la hejmo, kiu estas la unua afero, kiun vi tuj faras?

Apenaŭ mi alvenas al la hejmo, mi tuj brakumas mian hundon.

Ĉe la alveno en vian domon, kion vi ofte faras komence?

Ĉe la momento de mia alveno, mi rapidas ĉirkaŭpreni mian hundon.

1. **Kiu estas la unua ago, kiun vi kutime faras, apenaŭ vi alvenas hejmen ĉiutage?**
2. **Se vi havas hundon aŭ katon, kiu estas ĝi?**
3. **Kion ĝi ofte faras, revidante vin?**
4. **Kiel vi akiris ĝin?**
5. **Ĉu vi konvinkiĝas, ke la nuntempaj dombestoj estas pli inteligentaj ol tiuj de antaŭe? Kial?**



Mi profitos, ke la pluvo ĉesis, por foriri hejmen.

Ĝis baldaŭ!

Ĝis revido!

Profitante, ke la pluvo finiĝis, mi jam reiros al mia domo.

Ĝis la revido!

Ĝis la!

Mi profitos la okazon, ke jam ne pluvas, kaj tuj hejmeniros.

Ĝis alia fojo!

Ĝis!

1. **Kiom da fojoj pluvis en via regiono en la lasta semajno?**
2. **Kial ordinare la homoj kuras de la pluvo, eĉ se ili estas banantaj sin ĉe plaĝo, naĝejo aŭ rivero?**
3. **Kiam la pluvo kaptis vin surstrate lastfoje, kion vi faris por protekti vin?**
4. **Kie pluvas ĉiutage en Brazilo? Ĉu vi scias?**
5. **Kial oni ŝategas malsekiĝi en la pluvo, kiam li estas infano?**



Kie vi pasigos vian venontan libertempon?

La venontan libertempon mi pasigos en Portugalujo.

En kiu loko vi restos en la venonta libertempo?

Mi ankoraŭ ne decidis prie, sed eble mi restos en Portugalio.

Kien vi iros la venontan libertempon?

Mi interkonsentis kun mia frato kunveturi Lisbonon.

1. **Kiam vi libertempos de via lernejo aŭ laborejo?**
2. **Kion vi pensas pri tio, libertempi sur la svisaj alpoj venontfoje?**
3. **Kie vi revas pasigi libertempon?**
4. **Ĉu vi jam rezervis libertempan semajnon por veturi al kongreso de Esperanto? Kiam? Kie?**
5. **Kiom da tagoj vi libertempas de via laboro aŭ studado ĉiujare?**
6. **En kiu monato de la jaro vi plej ofte libertempas?**

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

